# La 31an de decembro 2015

## Kio estas paco ?

La 23an de junio 2013 okazis la Ceremonio por konsoli mortintojn en la batalo de Okinavo. En ĝi la 6-jara knabo Asato Juuki deklamis sian poemon “Kio estas paco”. Kiel mi skribis en la 5a de oktobro, en Okinavo okazis granda batalo inter la japana kaj usona armeoj en 1945 kaj multaj loĝantoj envolvite mortis. Memore al la batalo, ĉiun jaron okazas tiu ceremonio. Fine de la jaro 2015 mi tradukos la poemon.

### Kio estas paco?

Mi pensis.
Mi estas amikaj kun miaj amikoj.
Miaj familianoj fartas bone.
Mi ludas kun ridoj.
Mia kato ridas.
Mi estas sata.
Kaproj marŝas malrapide.
Mi tuj reamikiĝas kun miaj amikoj post kverelo.
Kreskas multe herboj “Longa vivo” [*1].
La ĉevalo Jonaguni[*2] henas.
En la haveno haltas pramŝipo,
kaj en la maro naĝas kelonioj[*3] kaj ksifioj[*4].

Aperas ĉielarko el niaj bonaj koroj.
Paco estas bona.
Paco estas bonvena.
El ĉiuj koroj naskiĝas paco.

Militoj estas teruraj.
Bum! Bum!
Falas bomboj,
kaj infanoj suferas en malsato.
Homoj ploras, perdinte siajn familianojn.
Aĥ, mi estas feliĉa naskiĝinte en paco.
Mi esperas, ke paco daŭros eterne,
Mi esperas, ke ĉiuj ridoj daŭros eterne.

Pacaj familioj.
Pacaj lernejoj,
Paca insulo Jonaguni,
Paca insulo Okinavo.
Paca mondo.
Paco estas bonega.
Por ke paco daŭru eterne
ankaŭ mi faros, kion mi povas fari.

Feliĉan novan jaron al ĉiuj. Ankaŭ mi esperas pacon en la mondo, kaj mi faros, kion mi povas fari.

*1. Herbo Ĉoomeisoo (Longa vivo)

*2. Ĉevalo Jonaguni

*3. Kelonio

*4. Ksifio